

Revuo, 56, 81-86.

Nagata H. (2005b). Konstanta stato kiel lingvoscio ĉe Chomsky: Ĉu ĝi estas efektive stabila kaj unuforma? *Scienca Revuo*, 56, 81-86.

Nagata H. (2005c). The role of emphasis and argument order in the judgments of grammaticality of Japanese bitransitive sentences violating Chomsky's principle of Full Interpretation. *Psychologia*, 48, 1-13.

Nagata H. (2006). Judgments of grammaticality of Japanese simple sentences involving two arguments in a whole-part relation: A further examination of Chomsky's principle of Full Interpretation. *Perceptual and Motor Skills*, 102, 855-870.

Nagata H. & Bain B. (2000). Judgments of grammaticality of sentences with a differing number of arguments: A comparison of English and Japanese speakers. *Perceptual and Motor Skills*, 91, 503-511.

Osgood C. E. (1980). *Lectures on language performance*. New York: Springer-Verlag.

Rayner K., Carlson M. & Frazier L. (1983). The interaction of syntax and semantics during sentence processing: Eye movements in the analysis of semantically biased sentences. *Journal of Verbal and Verbal Behavior*, 22, 358-374.

Rumelhart D. E. & McClelland J. L. (1986). On learning the past tenses of English verbs. En *Parallel distributed processing*. Vol. 2. (pp. 216-268.) Cambridge, MA: MIT Press.

Russell J. (2004). *What is language development?* Oxford: Oxford University Press.

Sampson G. (2005). *The 'language instinct' debate*. Revised ed. London: Continuum.

Savin H. B. & Perchonock E. (1965). Grammatical structure and its immediate recall of English sentences. *Journal of Verbal Learning and Verbal Behavior*, 4, 348-353.

Seuren P. A. (2004). *Chomsky's minimalism*. New York: Oxford University Press.

Steinberg D. D. (1975). Chomsky: From formalism to mentalism and psychological invalidity. *Glossa*, 9, 218-252.

Steinberg D. D. (1976). Competence, performance and the psychological invalidity of Chomsky's grammar. *Synthese*, 32, 373-386.

Thomas M. (1991). Universal grammar and the interpretation of reflexives in a second language. *Language*, 67, 211-239.

Tomasello M. (2003). *Constructing a language: A usage-based theory of language acquisition*. Cambridge, MA: Harvard University Press.

Wasow T. & Arnold J. (2005). Intuitions in linguistic argumentations. *Lingua*, 115, 1481-1496.

Adreso de la aŭtoro

Prof. Hiroshi NAGATA

Department of Clinical Psychology

Kawasaki University of Medical Welfare

288 Matsushima, Kurashiki 701-0193 / JAPANIO

hinagata@mw.kawasaki-m.ac.jp

Priaŭtoro informo

La aŭtoro estas profesoro pri psiĥologio kaj speciale studas psiĥolingvistikon rilate al lingvoscio kaj ties akirado fare de denaskaj parolantoj.



La lingva diverseco de Eŭropo prezentita je la esprimo por “tombejo”

Wolfgang VIERECK

1. Enkondukaj rimarkigoj

Ĉi tiu geolingvistika artikolo estas rezulto de mia laboro pri la *Atlas Linguarum Europae*, al kiu mi estas ligita ekde 1992 en diversaj funkcioj, ekde 1998 kiel prezidanto. Ĝi daŭrigas la vicon de kontribuoj, kiujn mi verkis pri diversaj aspektoj de tiu projekto (kp. Viereck 2001, 2004, 2006). Post la etimologiaj klarigoj sekvas semantikaj, precipe kulturhistoriaj rimarkigoj. La plej multaj menciitaj esprimoj estis enketitaj kadre de la eŭropa lingvoatlaso, nome per la demando

„*Quel est dans votre dialecte le nom du terrain où se trouvent plusieurs de ces endroits?*”

[Kio estas en via dialekto la vorto por la tereno en kiu troviĝas pluraj tiaj lokoj?]

Senpere antaŭe oni demandis:

„*Quel est dans votre dialecte le nom du trou dans la terre où l'on met le mort?*”

[Kio estas en via dialekto la vorto por la truon en la tero, en kiun oni metas la mortintojn?]

2. Etimologiaj konsideradoj

Ĉi tie mi disigas inter hindeŭropaj kaj ne-hindeŭropaj lingvoj. Mi komencas per la unue nomitaj, kiuj estis kaj estas klare dominantaj en Eŭropo. Kompreneble la nova formaĵo *tombejo* en Esperanto ne estas pritraktata. La deriva silabo "-ej" signifas lokon, kie troviĝas – tiukaze – tombo(j).

2.1. Hindeŭropaj lingvoj

La modernajn esprimojn por ‚tombejo‘ oni povas derivi de jenaj radikoj:

2.1.1. Hindeŭrope **kei*, ‚kuŝi; kuŝejo, hejmo, hejmeca, kara‘ (Pokorny 1959: 539; Rix & Kümmel 2001: 320).

El la radiko unue formiĝas **koi-to-* ‚kuŝejo‘ kaj ankaŭ **kei-mo-*, **koi-mo-* kaj **kei-uo-*, **ki-uo-* ‚familiara‘. Poste el tio rezultis greke *κεῖται* ‚kuŝas‘ kun la infinitivo *κεῖσθαι* ‚kuŝi, troviĝi, okazi ktp.‘ kaj la substantivaj derivaĵoj *κοῖτος* ‚kuŝejo, lito, dormo‘ kaj *κοιτητήριον* ‚dormĉambro‘. Malnove heredita substantiva derivaĵo estas *κοῖμη* aŭ **κοῖμος* kun la denominativo *κοιμάω* resp. *κοιμάν* (pasivo) ‚enlitigas, endormigas, ekdormas, dormigi‘ (kp. Hemme 1979: 160; Pokorny 1959: 539; Frisk 1960: 892). De tio devenas *κοίμησις* ‚sin-kuŝigo, (mort)dormo‘ kaj *κοιμητήριον* ‚dormĉambro, -ejo, -loko, trankvilo, (en kristanaj skribaĵoj) tombejo, entombiga loko‘ (kp. Frisk 1960: 809; Rey 1993: 422; Oxford English Dictionary, sekve OED, 1989, 2: 1027). El *κοιμητήριον* de la greka eklezia lingvo formiĝis latine *coemeterium* ‚trankvilejo, entombiga loko‘, kiu ŝanĝiĝis en la kristana latina – verŝajne per la parolata lingvo – al *cimiterium*. Tiuforme ĝi estis pruntita en la latinidajn lingvojn (kp. Hemme 1979: 160 kaj Ernout & Meillet 1959: 130).

2.1.1.1. Latinidaj lingvoj

Tiumaniere estiĝis en 1155 france *cimetire*, kiu ŝanĝiĝis en la 13-a jarcento al la – ankoraŭ nuntempe uzata – formo *cimetière*, ‚tombejo, apudpreĝeja korto, mortint-, dio-agro‘ kaj en la 16-a jc. akiris aprobon kiel norma formo, dum en la okcidento de Francio konserviĝis la regiona vario *cimentière*. La formo pruntita el la malfru-latina forpuŝis en Francio, krom en la valona kaj lotaringa lingvoj, la vorton **aître*, kiu devenas de latine *atrium* ‚korto‘ kaj en la mezepoko jam havis la signifon ‚(apudpreĝeja) antaŭplaco, antaŭkorto‘ (kp. Rey 1993: 422; Bloch 1975: 133). La formoj en la romanidaj lingvoj tre similas. Jam en la itala tri formoj estas nomataj: *cimitero* (Reininger 2002: 307), *cimeterio* (Hemme 1979: 160) kaj *cimenterio* (Diez 1887: 99) ‚tombejo‘. Diez nomas la saman formon ankaŭ por la hispana, sed ĉe de Silva oni trovas la varion *cementerio*, tombejo, apudpreĝeja korto, dio-agro (de Silva 1985: 116). Katalune *cementiri* (Quintana 1981: 270), portugale *cemiterio* (Michaelis 1965: 242) kaj rumane

cimitir (Coirănescu 1966: 180) signifas kaj ‚tombejo‘ kaj ‚apudpreĝeja korto‘.

2.1.1.2. Germanaj lingvoj

Mezangle *cymytery* aŭ *cimiteri* devenas de la latina pere de la franca; en la frunovangla eĉ troviĝas la formo *coemiteri*, kiu estas simila al la origina vorto. Ĉe tio – almenaŭ ekde la 19a jc. – superis *cemetery* en la signifo ‚loko por la enterigo de la mortintoj‘. Sed en Anglio oni nomis per tio komence nur la subterajn tombejojn de la romianoj, la katakombojn. La brita insulo estas la sola regiono de la ĝermana lingvospaco, en kiu la hindeŭropa radiko pluevoluiĝis. La signifo ‚entombiga placo‘ estis tradiciita kun la laŭvorta signifo de greke *κοιμητήριον* ‚ripozejo aŭ dormejo‘, ĉar oni ja parolas pri la morto kiel eterna dormo (Partridge 1978: 88).

2.1.1.3. Slavaj lingvoj

Verŝajne el france *cimetière* – aŭ el iu el la plaj malnovaj variantoj – la termino estis pruntita al la slavaj lingvoj; kp. slovake *cintorín* aŭ pole *cmentarz* (Piprek & Ippoldt 1969, 1: 624, 885). El la pola estis pruntita roma-ciganlingve *smentaris* ‚tombejo‘ (Wolf 1960: 207). Plie en Slovenio aperas diversaj dialektaj esprimoj: *cintor* estas pruntaĵo el hungare *cinterem*, kiu troviĝas en nordorient-slovenaj dialektoj (origine el latine *cimiterium/coemeterium*). Kromaj slovenaj dialekt-esprimoj, kiu devenas de latina radiko, estas *samitere*, *simiterih* kaj *satmitierse*. Ĉe tio temas pri pruntaĵoj el la itala kaj friula.

2.1.2. Hindeŭrope **keu-*, **keuə-*: **kū-*, **kuā-* ‚ŝveli, ŝvelaĵo, arkaĵo‘ kaj ‚kavaĵo, kava‘, ‚arkaĵo eksteren aŭ internen‘ kaj hindeŭrope **gher-*, kapti, preni, ĉirkaŭpreni, ĉirkaŭi (Pokorny 1959: 592ss. kaj 442ss.).

En la okcidentĝermana lingvospaco oni diferencigas inter *Friedhof* (tombejo) kaj *Kirchhof* (apudpreĝeja korto), plej ofte oni ligas loksignadon kun la esprimoj. Sed en la nordĝermanaj lingvoj la signifoj ‚tombejo‘ kaj ‚apudpreĝeja korto‘ kuniĝas. Oni ne diferencigas inter diversaj loksignadojn. Hindeŭrope **keu-*, **keuə-*: **kū-*, **kuā-* komence evoluiĝis al **kouə-ro-s*: **kū-ro-s* ‚ŝvelinta, forta, heroo‘. Kun la signifo ‚ŝveli‘ el tio rezultas greke *κόπιος* ‚forto, potenc-havanta, reganta, aŭtoritata; sinjoro‘. De *κόπιος* deriviĝas la adjektivo *κυριακός* ‚apartenanto al sinjoro‘, kiu fariĝis per substantivigo *κυριακόν* ‚apartenanto al sinjoro‘. El tio evoluiĝis en la malfru-greka la vulgarformo

*κυρική (en la novtestament-greka κυρίακή ‚dimanĉo‘) aŭ κυρικόν ‚dio-domo‘ (kp. Kluge 2002: 489 kaj Auberle 2001, 7: 406)¹.

2.1.2.1. Ĝermanaj lingvoj

Okcidentĝermane *kirika* fariĝis malnov-angle *cirice*, *circe*, kiu tra mez-angle *chirche*, *chereche*, *chiriche* evoluis al nov-angle *church* ‚preĝejo‘. Ekde la mez-angla oni uzis precipe en la nordo de Anglio kaj en Skotlando la variojn *kirk*, *kirke* aŭ *kyrke*, kiuj tamen en anglaj dialektoj kaj loknomoj estis uzitaj ĝis *Norfolk*. La kontinentaj formoj eble originas en malnov-angle *cirice*, *cyrice* kaj estis portitaj de anglaj misiistoj al la ĝermanoj en la eŭropan firmteron, sed verŝajne oni tie konis ilin pli frue. Tio ankaŭ klarigus, kial en la ĝermanaj lingvoj ne superis la formo *ἐκκλησία/ecclesiā*, kiu estis ĝenerale uzata kaj en la greka kaj en la latina kaj origine signifis ‚popolkunveno‘ krom ‚kunveno de la kredantoj, eklezio‘ (Hemme 1979: 235), sed la verŝajne multe pli malnova esprimo, kiu jam estis konata en tiu regiono.² La malnov-altgermanaj variantoj *kirihha*, *kiricha*, *chirihha* aŭ ankaŭ *kilihha*, mez-altgermane *kirche* indikas pri malnov-sakse *kirika*, *kirica*, *kerika*, sed laŭ alia ebleco ili devenas de malnov-frise *kerke*. Ekde la 8a jc. la esprimo *kirche* estis fiksita kaj konserviĝis en tiu formo ĝis hodiaŭ. En la nordo de Germanio supozeble la dialekta varianto *kilche*, *chilche* (< malnov-altgermane *chilecha*, *chilcha*) estis disvastiĝinta. Por la malnovfriesa ekzistas malsamaj informoj en la diversaj fontoj: laŭ Kluge la formoj *kerke*, *zerke* estis pruntitaj el la greka vulgarformo *κυρική* (kp. Kluge 2002: 489), la OED mencias la malnov-frisajn variojn *szereke*, *szurke*, *tzierka*, *tziurk* kaj ĉe Grimm troviĝas krome *karka* (kp. OED 1989, 3: 199 kaj Grimm 1873, 5: 790). La mez-basgermana esprimo estas identa kun mez-nederlande *kerke* (nov-nederlande *kerk*), kiu ankoraŭ estas bone konata en la nuntempa basgermana.

En la malnov-norda estas dokumentitaj *kirkia* kaj *kyrkja*, en la sveda *kyrka*, en la dana *kirke* kaj en la islanda *kirkja*. Ne estas tute klarigeble, kiu hindeŭropa radiko ekz. estas la origino de nuntemp-angle *yard* ‚placo, korto, ĝardeno‘. Sed estas verŝajne, ke *yard* aŭ ankaŭ france *cour* ‚korto‘ devenas de latine *cohors* ‚ĉirkaŭbarejo, eskorto, korpogardisto de militestro‘ resp. latine *hortus* ‚ĝardeno, ĉirkaŭbarejo‘. Ĉe tio *cohors*, kromformo *cors*, ‚ĉirkaŭbarita kort-spaco, brutkorto, aro, eskorto‘ kunmetiĝas el **co-* kaj hindeŭrope **ĝhrtis* ‚kunigo‘, kiu evoluis per vokalaŝanĝo al *hortus* kun la signifo

‚ĝardeno kiel ĉirkaŭbarita loko‘. Praparenca kun la latina esprimo estas greke *χόρτος* ‚placo, korto, paŝtejo‘ (kp. Hemme 1979: 382 kaj Pokorny 1959: 442). Hindeŭrope **gher-* ‚preni, ĉirkaŭpreni, ĉirkaŭi‘ pli iĝis al **gherdh-* aŭ **gherd-* ‚ĉirkaŭpreni, -bari, -zoni‘ resp. per substantivigo al **ghortos* ‚ĉirkaŭbarita loko‘ kaj **ghordhos* ‚ĉirkaŭbarejo‘. En la esplorado ne ekzistas konkordo pri la ekzakta disvastiĝ-vojo de tiu vorto precipe en la ĝermanan spacon. Sed estas certe, ke tiu formo disvastiĝis ekde la 4a aŭ 5a jc. en la ĝermanajn lingvojn per la kristanigo kaj la eklezia lingvo.

Germane *Hof*, origine ‚ĝardeno, herbttereno, kultivata tereno‘, ankoraŭ nuntempe ‚ĉirkaŭbarita ĝardeno‘ aŭ ankaŭ ‚ĉiu ĉirkaŭbarita loko ĉe domo‘ (kp. Grimm 1877, 4,2: 1654) verŝajne devenas de latine *hortus*, kvankam ekzistas aliaj klarigoj (vidu 2.1.3.1). Aliflanke la origina signifo de *Hof* estas identa kun greke *πεδῖον* kaj latine *campus* ‚ebena kampo‘ (kp. Ernout & Meillet 1959: 90s.), kiu nur en la latinidajn lingvojn pluevoluis (vidu 2.1.7.2).

Laŭ OED *churchyard* – en Skotlando ankaŭ *kirk-yard*, en nord-anglaj dialektoj krom *kirk-garth* ankaŭ *church-garth* – nuntempe signifas ‚korto aŭ ĉirkaŭbarita loko kun preĝejo‘ (1989, 3:206). La vorto estas unue dokumentita en la jaro 1154 (en la skribmaniero *cyrceiærd*).

Germane *Kirchhof* aperas laŭ Kluge – kiel angle *churchyard* – en la 12-a jc. en la mez-altgermana, mez-basgermane *kerkhof*, kaj komence signifas ‚korto antaŭ preĝejo‘, ĉe Grimm pli speciale ‚ĉirkaŭbarita, ĉirkaŭmurigita aŭ libera spaco ĉirkaŭ preĝejo‘. En la frua nov-altgermana tempo en la nordo kaj okcidento la esprimo mallarĝiĝis al ‚entombiga loko‘ (kp. Kluge 2002: 489). La pli malnova skribmaniero *chirichhof* indikas pri la perado de la unua elemento el la angla spaco.

Malnov-norde *gardr* ‚barilo, ĉirkaŭbarejo, korto, bieno‘ aŭ *gjord* ‚zono‘ supozeble estas derivaĵo de la teŭtona radiko **gerd-*: **gard-*: **gurd-*. El la malnov-norda evoluis svede *gård* ‚placo, korto, ĝardeno‘, islande *búgardur* ‚korto‘ kaj dane *gard* ‚placo, korto, bieno‘. Norvege *gård* krome signifas ‚barilo, ĝardenbarilo, ĉirkaŭbarilo; postkorto, domo‘ (Hustad 1979: 190). La ĉi tie gravaj kunmetaĵoj estas islande *kirkjugardur* ‚tombejo, apudpreĝeja korto‘, svede *kyrkogård* ‚tombejo, apudpreĝeja korto‘ kaj norvege *kirkegård* ‚tombejo, apudpreĝeja korto, entombiga loko‘.

2.1.2.2. Slavaj lingvoj

Ankaŭ en la slavaj lingvoj oni povas derivigi la esprimojn por eklezio el greka origino (kp. *Sadnik & Aitzetmüller* 1955: 220): malnov-slave *crĭky* en la 10-a jc. > *crŭky*, tiam *crŭkŭve*, *cĭrkovi*, el kio evoluis slovene *cerkva*, *cĕrkev*, simile slovake *cirkev*. En Rusio ekzistas signifodiferenco inter *cerkovĭ* kaj *kirka*, kiu pruntiĝis de germane *Kirche*, ĉar *kirka* nur rilatas al la evangelia eklezio (kp. *Vasmer* 1976, 1: 561). Ruse *cerkovĭ* kaj bulgare *czrkva* supozeble pruntiĝis el malnov-eklezio-slave *crokzy*, *crokzve* 'eklezio', ĉe kio en la bulgara venkis ŝajne la pli nova pruntaĵo *ĉerkva*, *ĉerkova* (kp. *Vasmer* 1980, 3: 290). En Kroatio ekzistas krom *crkva* ankaŭ la esprimo *hram* kaj la soraba lingvo havas eĉ tri terminojn: *kemšacy* resp. *-šany* aŭ *cyrkwinski* (*Uroić & Hurm* 1994: 429; *Rězak* 1987: 553). La malnoviĝinta ĉefia formo *cĭrkev* 'kristana eklezio' resp. 'kristanaro' (nuntempe *kostel* aŭ *chrám*³ estas pli bone konataj) konformas al pole *cerkiew* resp. *kerkiew* 'greka eklezio'; ĝenerale la esprimo por eklezio en Pollando estas *kościół* (kp. *Henschel & Kabesch* 2000: 744; *OED* 1989, 3: 199; *Piprek & Ippoldt* 1969: 884). Nur serbo-kroate dialekte *crkveno dvorište* 'preĝejokorto' (el serbo-kroate *crkva* 'preĝejo' kaj *dvorište* 'korto'; kp. *Benson* 1990: 125; *Uroić & Hrum* 1994: 383) estas menciinda kiel kunmetaĵo.

2.1.3. Hindeŭrope **pri-*, **prāi-*, **prāi-*, **prī-* 'ŝati, indulgi, pacemaĝa karaktero' (*Pokorny* 1959: 844) resp. **preiH-* 'esti/iĝi intima, kara' (*Rix & Kümmel* 2001: 490) kaj **keu-p-* 'arkaĵo supren, amaso kaj similaj' (*Pokorny* 1959: 591).

Ĉi tie oni povas atentigi pri sanskrite *priyá-* 'kara', *priyatá* 'amato', *prīti-* 'ĝojo, amikeco', *prīnāti* 'ĝojigita', *prīta* 'gaja, kontentigita; amata' (kp. *Kluge* 2002: 316, *Pokorny* 1959: 844 kaj *Holthausen* 1934: 116s.). Al tiu parenkaro ankaŭ apartenas kimre *rhydd* 'libera'.

2.1.3.1. Ĝermanaj lingvoj

La hindeŭropa radiko postlasis klarajn spurojn en la ĝermanaj lingvoj. Oni ĉi tie povas atentigi interalie pri malnov-angle *frĕo*, *frĭo* 'libera, gaja' (> nov-angle *free*), malnov-altgermane *frī*, gote *frei-s*, malnov-angle *frĕond* 'amiko, amanto, parenco' (nov-angle *friend*), malnov-altgermane *friunt* en la sama signifo⁴; malnov-angle *frĕod*, *frĭod* 'paco, amo, amikeco', malnov-angle *frīodu*, *frēodu*, *frīd(u)* 'paco, ŝirmo, trankvilo, sekureco' (> nov-angle *frith* [malnoviĝinta], an-

stataŭigita per *peace* [< latine *pācem* > malnov-france *pais*]), malnov-altgermane *fridu* 'paco, ŝirmo, sekureco, ĉirkaŭbarado' (8a jc.) (> nov-altgermane *Friede[n]*), nov-nederlande *vrede*, malnov-norde *frīð-r*, nov-svede *fred* 'paco', *frid* 'trankvilo'; malnov-angle *frĕogan*, *frīogan*, *frĕon* 'liberigi; ami, honori' (nov-angle *to free*), mez-altgermane *vrījen* kaj malnov-angle *frīdian* 'fari pacon; gardi; ami, flegi, paŝti' (> novangle *to frith* [malnoviĝinta] 'fari pacon'), gote *freidjan* 'indulgi', malnov-altgermane *frīdon*, mez-altgermane *vrīten* 'flegi, paŝti, gardi, indulgi'.

De la malnov-altgermana verbo finfine deriviĝas *frīthof*, origine 'ĉirkaŭbarita korto, antaŭkorto, ĉirkaŭbarita parcelo' (kp. *Pokorny* 1959: 844 kaj *Kluge* 2002: 316), mez-altgermane *vrīthof* 'antaŭkorto de domo aŭ preĝejo' (*Auberle* 2001: 237). La vorto daŭrigas en frunov-altgermane *Freithof*, kio regione konserviĝis de Svabio ĝis Aŭstrio. Nov-altgermane *Friedhof* estiĝis laŭ la ekzemplo de la praparenca vorto *Friede*. La rilato al la paca trankvilo de la entombigoj estas moderna.

Kiel jam menciite ekzistas malsamaj klarigoj pri la origino de malnov-ĝermane *hof*, kiel en germane *Friedhof*, *Kirchhof* aŭ nederlande *kerkhof*. Krom la jam nomita hindeŭropa radiko **gher-* oni konsideru ankaŭ hindeŭrope **keu-* 'fleksi' resp. ties labial-pligrandigon **keu-p-* kun la signifo 'arkaĵo supren, amaso' aŭ ankaŭ 'altaĵo, monteto', ĉar korto malnovtempe ofte troviĝis sur altaĵo; oni komparu norvege *hov* 'monteto, malgranda altaĵo; pagana templo' aŭ malnov-altgermane *hovar* 'ĝibo' kaj *hubil* 'monteto'. Ankaŭ signifoŝanĝiĝo de 'fleksi' al 'volvi, plekti; plektaĵo, barilo' estas menciinda, pri kio atentigas malnov-ĝermane *hof* 'ĉirkaŭbarita spaco', kiu ĉirkaŭas unu aŭ plurajn konstruaĵojn aŭ spaco, kiu estas ĉirkaŭita de konstruaĵo aŭ pluraj konstruaĵopartoj, el kio finfine evoluis la signifo 'domo, loĝejo; farmdomo, parcelo kun konstruaĵo, posedaĵo, bieno'.

2.1.3.2. Slavaj lingvoj

En slavaj lingvoj hindeŭrope **pri-* ŝajne konserviĝis nur en regionaj dialektoj; kp. ĉefie *brĭtov* kaj slovene *brĭtof* (krome *brituh*, *butuh*, *tritof*, *fritof*). Laŭ *Berneker* (1908-1913) slovene *brĭtof* 'tombejo' deriviĝas de mez-altgermane *vrīthof* kaj finfine de **pri-*; kp. kontraŭe Miklosich (1886: 76s.; vidu ĉapitro 2.1.4). La ĉefia vario evoluis per metatezo kaj laŭ la ekzemplo de *hřebu*, *hřbĭti* al *hřbitov* (pli malnove *řbitov*).

2.1.4. Hindeŭrope **ghrebh-* ,grati⁺, ,skrapi⁺, ,fosi⁺, (Pokorny 1959: 455s.), **g^hreb^h-* ,fosi⁺ (Rix & Kümmel 2001: 201s.).

2.1.4.1. Ĝermanaj lingvoj

Tiu hindeŭropa radiko postlasis klarajn ŝpurojn en ĉiu ĝermanaj lingvoj. Tio validas kaj por la aktivaĵoj kaj por la substantivoj, kiuj estis formitaj el la verboj, ekzemple malnov-altgermane *grap* > nov-altgermane *Grab*, malnov-angle *græf* > nov-angle *grave*, malnov-norde *grof* > dane *grav*, svede *graf*, islande *gröf*. El la origina signifo ,en la teron fosita kavaĵo⁺ poste fariĝis prefere ,por la entombigo de mortintoj servanta tertruo⁺ (Auberle 2001: 285). Kunmetaĵoj indikas la lokojn, kie troviĝas pluraj tiaj tertruoj, tiel ekz. nov-angle *graveyard* ,tombejo⁺, kio – en sia origina signifo – konformas al germane *Begräbnisstätte* (*Stätte* < mez-altgermane *stat* ,loko, ejo⁺, de tio ankaŭ mez-altgermane *staten* ,porti al loko⁺, fortigite *bestaten* ,sepulti⁺, kiu kaŝante estas uzata por ,enterigi⁺). Krome oni atentigu pri norvege *begravelsesplads* ,entombigloko⁺, dane *begravelsesplads* kaj svede *begravningsplats* ,entombigplaco⁺ (kp. Haukøy 1971: 48; Henningsen 1993: 66; Hellwig & Kornitzky 1965: 58).

2.1.4.2. Slavaj lingvoj

Pro tio ke en la malnov-eklezi-slava *grebъ* ,fosi⁺ kaj *grobъ* ,tombo⁺ estas dokumentitaj, hindeŭrope **ghrebh-* estas ankaŭ origino por la slavaj terminoj, inkluzive de la baltslavaj. Tion montras latve *grebju*, *grebt* ,elskrapi⁺, kavigi⁺, enfosi per fospikilo⁺ (kp. Pokorny 1959: 456 kaj Rix & Kümmel 2001: 201). La vorto por ,tombo⁺ ankoraŭ nuntempe estas *grob* en la serbo-kroata, slovena kaj bulgara, *grób* en la pola kaj *hrob* en la ĉeĥa kaj slovaka.

Elirinte de la malnov-eklezi-slava tiu radiko plu evoluis al bulgare *grobŝte* (< malnov-bulgare *ghrobo-* kaj sufikso *-ŝte*) ,tombejo, apudpreĝeja korto⁺ kaj *grôblje* ,dio-agro⁺, kiu konformas al serbo-kroate *grobļje* ,tombejo, apudpreĝeja korto⁺ (kp. Berneker 1908-1913: 353; Uroič & Hurm 1994: 265). Ankaŭ en serbo-kroata dialekto ekzistas la formo *grobļje*, kiu tie signifas nur ,tombejo⁺, ĉar ĉi tie *crkveno dvorište* estas uzata por ,apudpreĝeja korto⁺ (kp. Benson 1990: 125). Slovene *grôblja* ja signifas ,ŝtonamaso⁺, sed ĉi-tie ekzistas la formo *grôbje* ,tombejo⁺, derivita de *grob* ,tombo⁺ (Berneker

1908-1913: 353). Pro spacaj kialoj estas neeble, nomi ĉiujn formojn, kiuj devenas de tiu radiko en la diversaj slavaj lingvoj.

2.1.5. Hindeŭrope **(s)kap-*, **(s)kep-*, **(s)kop-* ,per akra ilo labori⁺, ,tranĉi⁺ (Pokorny 1959: 930ss.), **(s)kep-* ,haki⁺, ,tranĉi⁺ (Rix & Kümmel 2001: 555).

De tiu radiko kun movebla *s* devenas litove *kāpas* kaj latve *kaps*, ambaŭ en la signifo ,tombo(altaĵo)⁺ (kp. Kareckaite & Kazlauskaite 1993: 66, 87). De litove *kāpas* deriviĝas litove *kapai* ,tombo, kripto⁺ kaj ,entombigplaco, tombejo⁺ kaj ankaŭ litove *kapines* ,tombejo, apudpreĝeja korto⁺. Greke (*σ)κάπετος* signifas ,fosaĵo⁺, ,tombo⁺ kaj malnov-ekleziio-slave *kopati* ,fosi⁺. Per aldono de prefiksoj kaj sufiksoj evoluis el tio slovene *pokopaslišče* ,tombejo⁺ (la esprimo por ,apudpreĝeja korto⁺ en la slovena estas *pokopaslišče ob cerkvi*). Ne nur en la slovena la terminoj por tombo kaj tombejo deriviĝas de du malsamaj radikoj, sed ankaŭ en la pola. Tion montras *kapi* ,tombejo⁺ kompare al *grób* ,tombo⁺ resp. *pogrzeb* ,enterigo, entombigo⁺.

2.1.6. Hindeŭrope **klā-* ,larĝe meti, surmeti⁺, **klā-to-* ,kovroŝtono⁺ (Pokorny 1959: 599).

Tiu radiko disvastiĝis kun la slava radikformo *klad-* en la malnov-slavan *klada*, *klasti* ,meti, starigi⁺ resp. en la malnov-bulgaran *klado*, *klasti* ,ŝarĝi, meti⁺, aldone ankaŭ ruse *kladú* ,pritondas⁺, ambaŭ parencaj kun litove *klóju*, *klóti* kaj latve *klāju*, *klāt* ,sterni, larĝe meti⁺ (kp. Miklosich 1886: 117; Pokorny 1959: 599). Ruse *kladbiŝče* ,tombejo⁺, aldone *klady*, *klastъ* ,meti, kuŝigi⁺, devenas de ukraine *kládoviŝče* (< **kladъba* ,kuŝigo⁺) kaj supozeble estas tabuvorto kun la origina signifo ,loko de la kuŝigo, entombigo⁺ (Vasmer 1976, 1: 565).

2.1.7. Hindeŭrope **uer-* ,fermi, kovri, gardi, savi⁺ (Pokorny 1959: 1160s.), ,protekti, savi⁺ (Rix & Kümmel 2001: 684s.).

La albana verbdevena substantivo *varr/vorr* ,tombo⁺ estas derivaĵo de tiu radiko (**uornā*). *Varr* estas la suda dialekta varianto, *vorr* la norda. En al albana ofte uziĝas la pluralo *varre/vorre* (-e estas la pluralsufikso) en la signifo ,tombejo⁺. Krome ekzistas la formoj *varrez/vorrez*, kies pluralo *varrezë/vorrezë* ankaŭ signifas ,tombejo⁺.

2.1.8. Alternativaj esprimoj en jam menciitaj lingvoj

En la greka ekzistas krom la termino *κοιμητήριον*, kiu estis transprenita kaj pluevoluigita en multaj eŭropaj lingvoj, ankaŭ la esprimo *νεκροταφείον*, entombigplaco por mortintoj, enterigplaco por mortintoj* (*Wendt* 1995: 191). La esprimo unuflanke devenas de greke *νεκρός*, mortinto, kadavro* < hindeŭrope **nek-ro*, mortinto, kadavro* el la radiko **nek-*, morto* resp. ,mortdetruo*, **neku-s*, mortinto, kadavro* kaj estis perita pere de la latina precipe en la latinidajn lingvojn kaj estis uzita ekskluzive en kunmetaĵoj (kp. *de Silva* 1985: 366; *Pokorny* 1959: 762), aliflanke de greke *θάπτω*, entombigi, enterigi*, derivaĵo *τάφος*, enterigo, tombo, tomba monumento* (kp. *Frisk* 1960: 653).

2.1.8.1. Ĝermanaj lingvoj

Nuntempe malofte uzata esprimo por tombejo en la germana estas *Gottesacker*. La esprimo estis kunmetita el malnov-altgermane *got* el ĝermane **gub-*, dio*, supozeble abstrakt-formaĵo kun derivanta *-t-* al hindeŭrope **gheu-*, verŝi* (origine ĉe oferadoj, pli poste honore al Dio) kaj malnov-altgermane *ackar*, mez-altgermane *acker*, kiu deriviĝas kun parencaj vortoj en aliaj hindeŭropaj lingvoj de hindeŭrope **agros*, kampo, agroareaĵo* de la verba radiko **ag-*, (per svingiĝantaj brakoj) peli* (kp. ankaŭ greke *ἀγρός*, kampo, grundo*). Origine *Acker* estas esprimo por ,tereno ekstere de loĝlokoj, kien oni pelis brutojn por paŝtiĝado aŭ tersterkado*. La vorto estas dokumentita en la malfru-mez-altgermana resp. en bohemaj fontoj kiel *goczacker* (1415) kaj origine signifas ,en kampoj situanta entombigplaco, kontraste kun tombejo*, t.e. ekstere de loĝloko sen proksimeco de preĝejo (kp. *Auberle* 2001: 21; *Kluge* 2002: 366; *Grimm* 1958, 4,1,5: 1201s.). Disvastiĝinta estis (kaj estas) la termino *Gottesacker*, tombejo, preĝeja grundo* antaŭ ĉio en la sudgermana kaj mezorientgermana spaco, precipe en Turingio. En la nederlanda estas dokumentita *Godsacker*. En la 17a jc. troviĝas *Gottesacker* kiel *gods aker* en anglaj vojaĝpriskriboj pri germanaj urboj, ekz. Lejpciko. *God's acre* estas unue dokumentita en la angla 1617 (*OED* 1989, 6: 647). Kp. ankaŭ la tiean atentigon pri 1. korintanoj 15, 36-44.

En la angla krome troviĝas pliaj terminoj, nome *burial-ground*, *burying ground*, peco da grundo, por entombigi mortintojn* aŭ *burial-place*, *burying place*, loko, kie oni entombigas mortintojn*. La frunov-angla formo *burial*, entombigplaco, tombo, tomba monumen-

mento* ekzistis ĝis la 17a jc. memstara, nuntempe oni per tio nur esprimas la ,agon de entombigo*, ankaŭ *funeral*.

2.1.8.2. Latinidaj lingvoj

Greke *νεκροταφείον* estas proksime parenca kun hispane *necrópolis* kaj france *nécropole* (< greke *νεκρός*, kadavro* plus *πόλις*, urbo*). Rilate al la antikveco oni uzas ankaŭ en la germana *Nekropole*, mortint-urbo*.

Germane *Gottesacker* estas konforma al la parafrazo de itale *camposanto*, tombejo, apudpreĝeja korto* (16a jc.) (*Grimm* 1958, 4,1,5: 1201), ankaŭ hispane *camposanto*, tombejo* kaj portugale *campo santo*, apudpreĝeja korto* (*Alvarez-Prada* 1977: 224; *Michaelis* 1965: 348) (< latine *campus sanctus*, sankta kampo*).

2.1.8.3. Slavaj lingvoj

Escepte de *kladbišče* aperas en la rusa krome *mogil'nik* por ,tombejo* (< ruse *mogila*, tombo, tombaltaĵo, kriptoj [entombigo]*, ankaŭ malnov-ruse *mogyla*, tombaltaĵo*, ukraine *mohýla*, teraltaĵo, tombo*, la origina signifo estis ,altaĵo*). Verŝajne la vorto havas rilaton al *mogo* kiel ,reganta loko* (kp. *Vasmer* 1979, 2: 143s.). En Slovenio ankaŭ *žégen* estas konata, pruntaĵo el malnov-altgermane *seĝan* resp. mez-altgermane *seĝen*, beno, krucsigno*, kiu devenas de latine *signum*. Parafratoj, kiel la jam menciitaj por la aliaj lingvogrupoj, kompreneble ankaŭ aperas en la slavaj lingvoj. Ekzemple jen kelkaj slovenaj: *božja njiva*, di-agro*, *božji vrt*, di-ĝardeno* kaj *vrt miru*, pac-ĝardeno*.

2.1.8.4. Keltaj lingvoj

Por ,tombejo* la keltaj lingvoj ĝenerale uzas pruntaĵon el la latina: *reliquiae* (= restaĵo) > malnov-irlande *reilic*, kimre *rhelyw*, bretone *relec* (*Vendryes* 1978: R17). En la nuntemp-irlanda *reilic* tekstas *rèilig* kaj en la skot-gaela *reidhlic*. Krome aperas esprimoj por ,tombejo*, kiuj estas parencaj unu kun la alia: bretone *bered* kaj kornvale *bedhros*.

3.1. Ne-hindeŭropaj lingvoj

3.1.1. Finno-ugraj lingvoj

En la hungara ekzistas diversaj eblaj esprimoj por ,tombejo, apudpreĝeja korto'. La ĝenerale valida vorto estas *temető*, origine prezenco-participo de la verbo *temet* ,entombigi' kaj unue dokumentita 1506 en la signifo ,entombigo', 1620 por ,tombejo'. Laŭ semantiko *temető* estas termino por la loko, kie oni entombigas kaj entombigas la mortintojn. Du kunmetaĵoj pravas tion: *temetőhely* ,loko, kie oni entombigas (mortintojn)' kaj *temetőkert* (kert ,ĝardeno'). La lasta estas malnoviĝinta (Benkő 1993-1997: 1500, 1540). Latinan originon havas la nuntempe malnoviĝinta resp. dialekta *cimiterem* (< latine *cimiterium/coemeterium*) kun la diaĥrone ordigitaj signifoj: 1. ,tombejo', 2. ,korto de preĝejo, antaŭpreĝejo', 3. ,preĝejo-kastelo', 4. ,kripto' kaj 5. ,kavalira salono de kastelo'. En la hungara krome estas dokumentitaj *isten kerti* ,ĝardeno de Dio' por ,tombejo' kaj kunmetaĵoj kun *sír* ,tombo', kies etimologio estas nekonata: *sírkert* ,tomboĝardeno' kaj *sírmez* ,tombokampo' (kp. germane *Gräberfeld*).

En la finna ekzistas du ĉefaj tipoj por ,tombejo'. La unua estas substantiva derivaĵo de la verbo *hautata* ,entombigi', siaflanke derivaĵo de *hauta* ,tombo' plus *maa*, supozeble de urala origino (Rédei 1988: 263s.), en la signifo ,tero, tereno, grundo': *hautausmaa* estas la norma termino, krome: *hautuumaa*, *hautuusmaa*, *hautoomaa*, *hautosmaa* kaj *hautamaa*. La dua tipo estas derivaĵo de la vorto *kalma* ,morto; mortinto' plus kolektiv-sufikso *-sto*: *kalmisto*. *Kalma* supozeble havas uralan originon; ĝi posedas etimologiajn ekvivalentojn en la mordvina kaj verŝajne ankaŭ en samojedaj lingvoj. Laŭ *Jorma Koivulehto* (Kulonen 1992: 288) la finnaj kaj mordvinaj esprimoj estas pruntaĵoj el proto-ĝermane **skalman-* ,morto'.

La plej multaj aliaj finnaj lingvoj uzas derivaĵon de *kalma* por ,tombejo': ingre *kalmat*, *kalmoit* (pluralo de *kalma*), karele *kalma*, ankaŭ *kalmisto*, *kalmismoa*, *kalmašikko*, vepse *kaum*, *koum* [l > u], *koumžom* (*kalma* + *maa*), *koumist*, vote *kalmad*, *kalmod* (pluralo de *kalma*) kaj estone *kalmo* (plus derivaĵoj kiel *kalmistu*, *kalmuaed* [aed ,barilo', ,ĉirkaŭbarita tereno']), *surmuaed* (*surnu* ,morta persono'), *matusaead* (*matus* estas derivita de la verbo *matma* ,enterigi') kaj *kabeliaed*, ĉe kio *kabel* estas pruntaĵo el germane *Kapelle* (laŭ Mägist 1982-1983: 632).

3.1.2. La semida / malta

El la araba verbo *difen* ,entombigi' fariĝis en la malta el *m* + vortradiko *midfen* por ,tombejo'. Sed la loĝantaro ne akceptis tiun vorton. Pro tio oni uzas en Malto por ,tombejo' la esprimon *cimiterju*, kiu origine devenas de la latina kaj estis pruntita el la itala.

3.1.3. Altajaj lingvoj (la turka)

La turkio-turka skriba lingvo havas jenajn esprimojn por ,tombejo': ili senescepte estas pruntaĵoj el la araba: *mezarlık* < arabe *mazar* ,pilgrimejo', ,sanktejo' (< arabe *zāra* ,viziti') + turka finaĵo *-lık* (formas *nomen loci*), *mezaristan* < arabe *mazar* + persona finaĵo + *-istan* (formas *nomen loci*) kaj *kabristan* < arabe *qabr* ,tombo' (< arabe *qabara* ,entombigi', ,enterigi') + persona finaĵo + *-istan* (formas *nomen loci*).

4. Semantikaj kaj kulturhistoriaj rimarkigoj

Ĉe la hindeŭropanoj la entombigo en kavoj aŭ rokmuroj superregis, poste antaŭ ĉirkaŭ 6000 jaroj en tielnomataj dolmenoj aŭ *tumuli*, tombaltaĵoj en la arbaroj. En la bronzepoko oni transiris al la kremacio de mortintoj, por poste entombigi ilin en urnotomboj (kp. *Buchberger* 1931, 2: 91s.). La grekoj komence enterigis siajn mortintojn, sed poste ankaŭ transiris al la kremacio, sen tute forlasi la enterigon. Ĉirkaŭ 600 a.K. disvastiĝis la kremacio ankaŭ en Italio. Ĉe la keltoj kaj ĝermanoj tio estis jam antaŭe ĉefa kutimo, sed estis forpuŝita per la kristanigo; tiamaniere la enterigo pli kaj pli graviĝis.

Komunaj entombiglokoj jam estas tre malnovaj kaj rilatas al la loĝmaniero de homoj en setlejoj: ankaŭ postmorte la anoj restu en komuneco. Sed jam en la antikva epoko la loka disigo de mortintoj kaj vivantoj havis grandan signifon. Pro tio oni lokis la tombejojn ekstere de la setlejoj. Decida estis ĉe tio la timo antaŭ la mortintoj, la kredo je mortintoj, kiuj nokte eble revenas, por sin venĝi je vivantoj aŭ por ilin tiri post si (*Baumgartner* 1987: 95). Tielnomataj nekropoloj ,mortint-urboj' jam ekzistis en la antaŭkristana epoko kaj estis transprenitaj de judoj kaj kristanoj. Tiuj superteraj ĉirkaŭmuritaj aŭ ĉirkaŭbaritaj tombejoj estis pligrandigitaj al subteraj katakomboj, kiuj precipe prosperis en la 4a jc. Ili estis fama ekzemplo por kristana entombig-maniero.

Baldaŭ la apudpreĝeja korto anstataŭis la katakombojn kiel entombiglokojn. Ekde la 3-a jc. estis por la homoj grava deziro, esti entombigita laŭeble plej proksime ĉe martiroj, por resurekti kun ili ĉe la lasta tago. Tiamaniere en Italio estiĝis la unuaj apudpreĝejoj kortoj, kiuj troviĝis pro la kristanigo de la ĝermanoj ankaŭ tie. La unuaj apudpreĝejoj kortoj norde de Italio estiĝis komence en la sudo de Germanio, ili estis ekde la 6-a/7-a jc. la oficialaj entombiglokoj. Plej ŝatataj estis tomboj en la preĝejoj aŭ ĉe la preĝejomuro. Entombigo en preĝejoj estis permesita nur por klerikoj kaj altrangaj burĝoj.

En la mezepoko la preĝejo kaj la apudpreĝeja korto estis centro kaj de la urba kaj de la kampara vivo. La apudpreĝeja korto estis uzata ankaŭ por spektakloj, kiel kunvenejo, kiel juĝejo kaj eĉ kiel brutpaŝtejo. Ofte oni okazigis tie bazaron. La nuntempa termino germane *Messe* por 'jarfoiro' montras klare la konekton inter preĝejo kaj foiro. La malbonaj kutimoj ĉe la apudpreĝejoj kortoj tre pliiĝis dum la mezepoko, ankaŭ la hororo- kaj fantomrakontoj pri "malmortintoj". Pro tio oni komencis kovri la tombojn per tomboplatoj (*Ausel* 1988: 37). Pli poste oni starigis la platojn ĉe la kapfino de la tombo; supozeble de tio devenas niaj nuntempaj tombŝtonoj. Kiam en la 14-a jc. komenciĝis la amasmortado per la pesto, kiu daŭris ĝis la 17-a jc., la higienaj kondiĉoj en la urboj – kaŭze de la apudpreĝejoj kortoj – pli kaj pli malboniĝis. Kiam la reformacio en la 16-a jc. – ekigita de *Martin Luther* – portis alian ideon pri la morto en la socion, oni iom post iom komencis fermi la apudpreĝejoj kortojn kaj konstrui novajn, komence provizorajn tombejojn, laŭeble plej malproksime de la urbomuroj.

En la novajn tombejojn oni faris tombokampojn kaj anstataŭ martir-preĝejojn oni poste konstruis tombejo-kapelojn. Pro tio ke apudpreĝeja korto estis sankta grundo, en kiu ripozis la sankta komunumo, la mortintoj denove estu entombigitaj en benita tero; do la tombejoj estis konsekritaj. Nun la tombejoj precipe servu al la *memento mori* por la vivantaj kaj konsolu ilin. Tiamaniere ankaŭ la estetiko pli kaj pli graviĝis.

Komence de la 19-a jc. la anglaj pejzaĝo-ĝardenoj ekinfluis la germanan tombejan kulturon. La pejzaĝo-ĝardenoj ne estas geometrie konstruitaj, sed havas iomete altajn terenon, kiu ne posedas fiksitajn vojo- aŭ tombostrukturojn kaj impresas per riĉa priplantado kaj riveretoj. Ekzemplo estas la tombejo de *Ohlsdorf* (en Hamburgo), kiu estis malfermita 1877 (kp. *Boehlke* 1987: 175s.; *Derwein* 1931: 137).

En la 20-a jarcento evoluis plia tombejoformo, ĉe kiu oni tre bone povas ekkoni la nuntempan komprenon pri entombiglokoj: la arbaro-tombejoj, kies unua aranĝiĝis 1905 en Munĥeno.

Notoj

- (1) Ĉe la indiko pri la tempa disvastigo de la vulgarformo *Auberle* (4a jc.) kaj *OED* 1989, 3: 199 (3a jc.) diferencas.
- (2) *Buchberger* montras plian disvastigeblon pere de la gotoj el la greka, sed li ne donas pruvilojn (kp. *Buchberger* 1933, 5: 968).
- (3) Tiel ankaŭ en aliaj slavaj lingvoj: bulgare *chram(-ove)* (origine 'domo') (*Sugareva & Atanassova* 1997: 477), kroate *hram* (*Uroić Hurm* 1994: 429), slovake *kostol* aŭ *chrám* (*Kováčová, Péchyv & Vokounová* 1991: 239).
- (4) En la rumana 'amiko' estas *prieten*; ciganlingve *priatino* (*Wolf* 1960: 185).

Dankesprimo

Mi dankas al *Enver Hysa, Jenő Kiss, Conny Kleinschroth, Vilja Oja, Sirkka Saari-nen, Jožika Škofic, Semih Tezcan, Joe Watson* kaj *Joe Zammit Ĉiantar* por ilia afabla helpo.

Bibliografio

- Alvarez-Prada, Enrique*. 1977. *Langenscheidts Handwörterbuch Spanisch. Zwei Bände, Zweiter Teil. Sechste Aufl.* Berlin: Langenscheidt.
- Auberle, Annette et al.* 2001. *Duden. Herkunftswörterbuch. Etymologie der deutschen Sprache. Dritte, neubearb. und erw. Aufl.* Mannheim: Dudenverlag.
- Ausel, Monika*. 1988. *Monumente des Todes – Dokumente des Lebens? Christliche Friedhofs- und Grabmalgestaltung heute.* Altenberge: Telos.
- Baumgartner, Jakob*. 1987. "Christliches Brauchtum im Unkreis von Sterben und Tod". In *Angesicht des Todes. Ein interdisziplinäres Kompendium I*. Hgg. *Hansjakob Becker et al.* St. Ottilien: EOS Verlag, 91-133.
- Benkő, Loránd*. 1993-1997. *Etymologisches Wörterbuch des Ungarischen.* Budapest: Akadémiai Kiadó.
- Benson, Morton*. 1990. *An English-Serbocroatian Dictionary.* Dritte Aufl. Cambridge: Cambridge University Press.
- Berneker, Erich*. 1908-1913. *Slavisches etymologisches Wörterbuch. Band I.* Heidelberg: Winter.

- Bloch, Oscar. 1975. *Dictionnaire étymologique de la langue française*. Sixième éd. Paris: Presses Universitaires de France.
- Boehlke, Hans-Kurt. 1987. "Kirchhof – Gottesacker – Friedhof. Wandlungen der Gesellschaft – Wandlungen der Pietät". In: *Im Angesicht des Todes. Ein interdisziplinäres Kompendium I*. Hgg. Hansjakob Becker et al. St. Ottilien: EOS Verlag, 163–180.
- Buchberger, Michael (Hg.). 1931–1938. *Lexikon für Theologie und Kirche*. Zweite, neubearb. Aufl. des kirchlichen Handlexikons. Freiburg i. Br.: Herder.
- Coirănescu, Alejandro. 1966. *Diccionario Etimológico Rumano*. Tenerife: Biblioteca Filologica.
- de Silva, Guido Gómez. 1985. *Elsevier's Concise Spanish Etymological Dictionary*. Amsterdam: Elsevier.
- Derwein, Herbert. 1931. *Geschichte des christlichen Friedhofs in Deutschland*. Frankfurt a. M.: Franzmathes.
- Diez, Friedrich. 1887. *Etymologisches Wörterbuch der romanischen Sprachen*. Fünfte Aufl. Bonn: Adolph Marcus.
- Ernout, A. & A. Meillet. 1959. *Dictionnaire étymologique de la langue latine. Histoire des mots*. Quatrième éd. Paris: Librairie C. Klincksieck.
- Fraenkel, Ernst. 1962–1965. *Litauisches etymologisches Wörterbuch*. Heidelberg: Winter.
- Frisk, Hjalmar. 1954–1972. *Griechisches etymologisches Wörterbuch*. Heidelberg: Winter.
- Grimm, Jacob & Wilhelm Grimm. 1854–1971. *Deutsches Wörterbuch*. Leipzig: S. Hirzel.
- Haukøy, Jens. 1971. *Gyldendals Handwörterbuch Norwegisch*. Zweiter Teil. Berlin: Langenscheidt.
- Hellwig, Hans & H. Kornitzky. 1965. *Langenscheidts Taschenwörterbuch Deutsch – Schwedisch*. Sechste Aufl. Berlin: Langenscheidt.
- Hemme, Adolf. 1979. *Das lateinische Sprachmaterial im Wortschatze der deutschen, französischen und englischen Sprache*. Leipzig 1904. Nachdruck Hildesheim/New York: Georg Olms.
- Henningsen, Henning. 1993. *Langenscheidts Taschenwörterbuch Dänisch*. 21. Aufl. Berlin/München: Langenscheidt.
- Henschel, Helgunde & Friedrich Kabesch. 2000. *Langenscheidts Taschenwörterbuch Tschechisch*. Fünfte Aufl. Berlin: Langenscheidt.
- Holthausen, Ferdinand. 1934. *Altenglisches etymologisches Wörterbuch*. Heidelberg: Winter.
- Hustad, Tom. 1979. *Großes Norwegisch – Deutsches Wörterbuch*. Oslo/Bergen/Tromsø: Universitetsforlaget.

- Kareckaitė, A., H. Kazlauskaitė & V. Kazlauskaitė. 1993. *Trumpas Voikiečių – Lietuvių ir Lietuvių – Voikiečių Kalbų Žodynas*. Kaunas: Šviesa.
- Kluge, Friedrich. 2002. *Etymologisches Wörterbuch der deutschen Sprache*. 24. Aufl. bearb. von Elmar Seebold. Berlin/New York: de Gruyter.
- Kováčsová, Eleonóra, Emilia Péchyvá & Alena Vokounová. 1991. *Deutsch – Slowakisches, Slowakisch – Deutsches Wörterbuch*. Bratislava: Slovenské pedagogické nakladateľstvo.
- Kulonen, Ulla-Maija. 1992. *Suomen sanojen alkuperä. Etymologinen sanakirja*. Helsinki: Suomalainen Kirjallisuuden Seura.
- Mägiste, Julius. 1982–1983. *Estonisches etymologisches Wörterbuch*. Helsinki: Helsingin Yliopiston Monistuspalvelu.
- Michaelis, Henriette. 1965. *Neues Wörterbuch der portugiesischen und deutschen Sprache*. Zwei Bände, zweiter Teil: Deutsch – Portugiesisch. 14. Aufl. New York: Frederick Ungar Publishing Co.
- Miklosich, Franz. 1886. *Etymologisches Wörterbuch der slavischen Sprachen*. Wien: Braumüller.
- OED = Simpson, J. A. & E. S. C. Weiner (comps.). 1989. *The Oxford English Dictionary*. Second ed. Oxford: Clarendon Press.
- Partridge, Eric. 1978. *Origins. A Short Etymological Dictionary of Modern English*. Fourth ed. London/Henley: Routledge & Kegan Paul.
- Piprek, Jan & Juliusz Ippoldt. 1969. *Großwörterbuch Deutsch – Polnisch*. Zwei Bände. Warschau: Wiedza Powszechna.
- Pokorny, Julius. 1959. *Indogermanisches etymologisches Wörterbuch*. Band 1. Bern/München: Francke.
- Quintana, Artur. 1981. *Handbuch des Katalanischen*. Zweite Aufl. Barcelona: Editorial Barcino.
- Rédei, Károly et al. 1988. *Uralisches etymologisches Wörterbuch*. Wiesbaden: Harrassowitz.
- Reininger, Anton. 2002. *Langenscheidts Handwörterbuch Italienisch*. Sechste Aufl. Berlin: Langenscheidt.
- Rey, Alain. 1992–1993. *Dictionnaire historique de la langue française*. Paris: Dictionnaires Le Robert.
- Rězak, Filip. 1987. *Deutsch – sorbisches enzyklopädisches Wörterbuch der Oberlausitzer Sprache*. Bautzen: Domowina.
- Rix, Helmut & Martin Kümmel. 2001. *Lexikon der indogermanischen Verben. Die Wurzeln und ihre Primärstammbildungen*. Zweite, erw. und verb. Aufl. Wiesbaden: Reichert.
- Sadnik, L. & R. Aitzetmüller. 1955. *Handwörterbuch zu den altkirchenslawischen Texten*. Heidelberg: Winter.

- Sugareva, Tekla & Vjara Atanasova. 1997. *Deutsch-bulgarisches Wörterbuch*. Zweite Ausgabe. Sofia: Atlantis.
- Uroić, Marija & Antun Hurm. 1994. *Deutsch – Kroatisches Wörterbuch*. Zweite Aufl. Zagreb: Školska Knjiga.
- Vasmer, Max. 1976-1980. *Russisches etymologisches Wörterbuch*. 3 Bände. Zweite unveränd. Aufl. Heidelberg: Winter.
- Vendryes, Joseph. 1959-1981. *Lexique étymologique de l'Irlandais ancien*. Dublin: Institute for Advanced Studies.
- Viereck, Wolfgang. 2001. *Pri la kulturhistorio de Eŭropo / Zur Kulturgeschichte Europas*. Acta Sanmarinensia Academiae Internationalis Scientiarum V.3 (2000). Göttingen: Leins.
- Viereck, Wolfgang. 2004. "Laboristo, Arbeiter, ouvrier, workman, raboĉij, obrero, operaio – etimologiaj kaj semantikaj rimarkigoj pri la plurlingveco de Eŭropo". *Scienca Revuo* 55: 163-178.
- Viereck, Wolfgang. 2006. "Tombo, Grab, grave, grob, sepulchro, tombeau, tumba – etimologiaj kaj semantikaj rimarkigoj pri la plurlingveco de Eŭropo". *Scienca Revuo* 57: 25-34.
- Wendt, Heinz. 1995. *Langenscheidts Taschenwörterbuch Neugriechisch*. 22. Aufl. Berlin: Langenscheidt.
- Wolf, Siegmund A. 1960. *Großes Wörterbuch der Zigeunersprache (romani ŝiw)*. Wortschatz deutscher und anderer europäischer Zigeuner-dialekte. Mannheim: Bibliographisches Institut.

Adreso de la aŭtoro

Prof. Dr. Dr.h.c.mult. W. VIERECK
Obere Dorotheenstrasse 5a
DE – 96049 B a m b e r g
GERMANIO

<wolfgang.viereck@split.uni-bamberg.de>

Priaŭtora informo

La aŭtoro estas emerita profesoro por anglaj filologio kaj mezepoka literaturo ĉe Bamberg-Universitato (Germanio) kaj orda membro de Academia Europaea (Londono) kaj efektiva membro de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) Sanmarino. Li estis prezidanto de International Association of University Professors of English, de Atlas Linguarum Europae, de International Society for Dialectology and Geolinguistics kaj editoro de ĝia revuo "Dialectologia et Geolinguistica".



Taksado de dialekta parolo: apriora perceptaĵo de dialekto

Daiva ALIŪKAITĖ

Vilniaus Universitato,
Kaunas Humanisma Fakultato (VU KHF)

1. Enkondukaj rimarkoj

La celo de tiu ĉi artikolo estas analizi taksadon, konceptadon de dialekta parolo aktualigante komprenon de dialekta perceptaĵo. La objekto de la artikolo estas: datumoj de anonimaj enketiloj de taksantoj de dialekto. Laŭ teoria aspekto en la artikolo oni apogiĝas sur tradicio de percepta dialektologio.

Unu el la komencintoj kaj flegantoj de la percepta dialektologio el Japanio Fumio Inoue kreis teorion de *dialekta perceptaĵo*. Kiel skribas la aŭtoro mem de la teorio, *dialektan perceptaĵon* eblas difini kiel socian psikologian (kaj regionan, kaj socian) perceptaĵon de dialekto [Inoue 1999: 147].

La kategorio de *perceptaĵo* enhavas unue la emocian rilaton de *naŭva* taksanto kun la dialekto. Esence la perceptiva strategio de taksado de dialektoj estas plie ligita kun emocia taksado de variantoj. Eĉ pli aŭ malpli intelektaj decidoj pri konkreta dialekto estas destinitaj de la emocia rilato al malsama parolo. Do malgraŭ tio, ke reprezentantoj de la skolo de percepta dialektologio distingas inter *intelektaj* kaj *emociaj* karakterizoj [Inoue 1999: 149], ecoj de dialektoj, indikitaj de la *naŭvaj* respondantoj preskaŭ ĉiam estas pli aŭ malpli emociaj: pli ĝusta (la eco en percepta tradicio akceptindas kiel intelekta taksado) varianta ŝajnas tiu, kiu plie rememorigas denaskan varianton, aŭ estas varianta de granda urbo, pli proksima al la komuna lingvo aŭ estas alimaniere *markita*.

2. Trarigardo de empiriaj datumoj

2.1. Trarigardo de la enketilo kaj amplekso de la esploro

En la artikolo oni priparolas esploron faritan laŭ metodologio proponita de D. R. Preston, reprezentanto de la percepta dialektologio